

Vol. 2

JANUARY, 1908

No. 6

THE NEW YORK  
PUBLIC LIBRARY

A Journal of the  
International Language

# AMERIKA ESPERANTISTO

(AMERICAN ESPERANTIST)

---

Per Copy, Ten Cents  
Per Year, One Dollar


1239 MICHIGAN AVENUE  
CHICAGO, U. S. A.





# ESPERANTO RECORDS

Columbia Jewel,  
fine reproduce,  
14-in. horn, oak  
case. \$20.00



**ESPERANTO** can be successfully studied without a teacher. Don't doubt that an instant! For those who desire every possible aid, and especially such as have no opportunity to hear the language spoken,

the phonograph is a valuable help. We can supply the following records:

**Number One:** Exercises from *The American Esperanto Book*, Nos. 1 to 4 inclusive. Price, \$1.00.

**Number Two:** Exercises 5 to 12 inclusive, except 11.

**Number Three:** First part of *La Feino*, same book.

**Number Four:** End of *La Feino*, and on most cylinders part the Correspondence forms. Each cylinder is *read* (not molded) by an expert linguist and Esperantist, Prof. O. H. Mayer, of Chicago.



Any one cylinder, postpaid, \$1.00. The set of four, by express, \$3.00. For \$6.00, a set of 8 cylinders, containing all exercises from the *American Esperanto Book*=*La Ekzercaro*. On this set, charges prepaid. Special cylinders, containing any selected matter, \$1.00 each.

*These records fit any cylinder machine made. We can not supply discs. We sell a powerful, high-class parlor concert Graphophone at \$20=manufacturer's price.*

## Set of Records Free!

To every person ordering the \$20 Graphophone we shall send **FREE** the set of four records, or for \$1.50 additional the eight-record set.

There are plenty of cheaper machines, but we have selected this \$20 Parlor Concert Graphophone because it combines durability and clear tone with a low price. We can sell you a machine at \$7, which we do not recommend, and carry others at \$30, \$40 and \$50. Remember that the regular music records, which are molded, sell at 25 cents each, so that your Graphophone may be both teacher and entertainer.

**AMERICAN ESPERANTIST COMPANY**  
1239 Michigan Boulevard CHICAGO

# AMERIKA ESPERANTISTO

Entered as second class matter June 28, 1907, at the post office at Chicago Illinois

**Monata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto**  
*Monthly Magazine of the International Language, Esperanto*  
1239 Michigan Avenue, Chicago

Jarabono, 1e en la Mondo, Unu Dolaro (Spesmiloj 2.05)  
*Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar*

**AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, ELDONANTOJ**  
*AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, PUBLISHERS*

Redaktoro : **ARTHUR BAKER** : *Editor*

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

**VOLUMO 2**

**JANUARO, 1908**

**NUMERO 6**

**Amerika Esperantisto** prezentas al la esperantistoj sin kiel bone funkcia maŝino por la disvastigado de la lingvo. Jam en ĉiu ŝtato kaj provinco de Nordameriko ĝi havas kunhulpantajn partojn, kaj per tiuj ĉi ĝi senĉese distribuas kaj dissemas propagandilojn. Sisteme kaj akurate ni konstante penadas pligrandigi ĝian efikecon. Pro tio, ke la laboro duobligas sian valoron kiam oni uzas bonan ilon, ni forte konsilas, ke *vi* uzu nian sperton kaj nian organizon, tiel ke via laboro havu plenan efikecon kaj portu al vi la kiel eble plej grandan rikolton. Kun tutaj niaj fortoj ni nun penadas, por ke nia februara propaganda numero estu bone redaktita, artiste presita kaj tute konvinkiga prezento de la afero por kiu ni laboras. Laŭ la poŝta leĝo de la U. S., estas permesate, ke ni presu nur *double* tiom da kajeroj, kiom estas venditaj. Tre gravas, ke ni presu grandegan nombron da tiu ĉi kajero, kaj tio ebligas *nur se vi*, karega kunlaboranto, komprenante tiun gravecon, mendos kelkajn *nun* pro via propra kalkulo. Ne sendu monon ĝis kiam vi ricevos la kajerojn kaj kontentiĝos. Sed skribu tuj, nun :

Sendu al mi dek (pli bone dudek aŭ kvindek) da la februara, kaj post la ricevo mi pagos po kvin cendoj.

La numero dirita enhavos 32 paĝojn, iome pligrandigitajn.

## JEN! LA NOVA RONDO

Rapidegante tra la senlimaj maroj de spaco, nia tera pilketo, kiel ludilo de ia juna diido, nun finas unu pluan rondiron. Kaj ĉe la komenco de la nova rondo, ni staru momenton kaj pripensu la demandon: kion signifas ĉi-tiu senfina rondirado, kaj al kio ĝi kondukas? Iam, antaŭ ducent rondoj, la homoj kredis sian loĝejon la centro de la tuta kreitaĵo. De tiam, oni konstatis, ke rilate al la tuto, nia terglobo havas malpli da graveco, ol milono de akvoguto rilate al la grandega terglobo mem. Sed tiu eltrovo ne multe ŝanĝis aŭ morojn aŭ religiojn de la homoj. Kvankam nun nenia homo, escepte ke li estas lertega mem-trompisto, povas sincere kredi sian rason la plej alta el la universo, la pli grava fakto ankoraŭ restas: ke por si mem la homa raso gravas super ĉiuj aliaj estaĵoj. Kaj ĝuste laŭ proporcio kiel la lumo de la scio forpelis la nebulan Olimpon, en tia sama mezuro jam komprenas la homaro, ke amo al la dioj estas bagatelo, ĉar al ili kaj iliaj diaj aferoj apartenas la nemezurbaj kampoj de la senlima ĉielo. Sed ni, senflugilaj, pezpiedaj teranoj, algluitaj per mil fortoj al nia sfera bulo naĝanta tra etera maro, al ni estas permesate ke ni penadu sur ĝi dum ĝi rapide plenigas sepdekon da rondoj. Kaj por nia дума feliĉo, treege gravas, ke ni ne tro malpacigu inter ni mem.

Al tiu celo ni disvastigu Esperanton. Kredeble la homoj neniam ĉesos, starante sur siafluganta peco da stelaĵo, rigardi supren kaj sopiri, miri. Sed venos la tempo kiam, forgesinte Olimpon, ili kune kaj pace ellaboros la plejan feliĉon de la homaro. Kaj kiel uilega ilo por tiu ellaborado prezentas sin Esperanto.

Ĉe la komenco de la nova rondiro tera, en ĉi-tiu jaro 1908, ni plifortigu nian decidon kaj pligrandigu nian penadon por Esperanto. Ni laboru, por ke, kiam ree ni trapasos jarfinon, ni povu postrigardi al granda tasko jam bone plenumita.

En la novan rondon! Antaŭen!

## ŜLISSELBURGA FORTIKAĴO

Laŭ rakontoj de unu maljuna Ŝlisselburgano esperantigis D. Morgano

Ŝlisselburga Fortikaĵo lokiĝas sur malgranda insuleto, ĝuste en tiu loko, kie rivereto Neva elfluas el Ladoga lago. Tiu ĉi insuleto estas tiel malgranda, ke fortikaĵaj muroj en multaj lokoj leviĝas rekte el akvo. Nur en unu loko verdiĝas peceto da tero, kaj poste ĉie—akvo kaj ŝtono. El post muroj estas vidata nur pinto de preĝeja turo (sonorilejo). Mallarĝa markolo apartigas la fortikaĵon de tiu loko de la kontinento, kie staras Ŝlisselburgo; de kontraŭkuŝanta flanko aliĝas Ladoga lago. Apud la elfluo de Neva el la lago, ĝuste kontraŭ la fortikaĵo, lokiĝas malriĉa vilaĝeto—Ŝersmetjevka. Inter tiu ĉi vilaĝeto kaj la fortikaĵo de longe fondiĝis mallarĝa interligo. La vilaĝeto liveras en la fortikaĵon, kiel por servantoj en ĝi, tiel ankaŭ por arestitoj, lakton, ovojn, kokinojn, kc. Komunikado inter fortikaĵo kaj urbo iĝas per apartaj regnaj vaporsipetoj. Preskaŭ meze de la fortikaĵa muro staras larĝa, masiva turo, nomata “cara” (reĝa). Tra tiu ĉi turo kondukas iro en la fortikaĵon. Tage kaj nokte tiu ĉi irejo estas gardata de fortika gardistaro. Dekstre kaj maldekstre de eniro laŭlonge de la fortikaĵaj muroj, troviĝas loĝejoj por arestitoj kaj gardantaro; tie ĉi ankaŭ lokiĝas diversaj metiejoj. La fortikaĵa korto prezentas malgrandan placeton, malvastigitan de ĉiuj flankoj per malafablaj malliberejaj muroj. Sur tiu ĉi placeto troviĝas: preĝejo, domo de la komandanto de la fortikaĵo, diversaj servistoj kaj aliaj konstruaĵoj, en kiuj loĝas oficiroj, kuracisto, pastro, k.t.p. Herbaroj kaj negrandaj grupoj de arboj, troviĝantaj inter la konstruaĵoj, ne povas moligi la pezan impreson, ricevatan per ĝenerala vido de la malliberejoj kaj turoj.

Ĝis jaro 1867 Ŝlisselburga fortikaĵo estis preskaŭ la ĉefa loko de ekzilo kaj meto de “krimuloj” kontraŭ la religio kaj la ŝtato. Tien ĉi estis ekzilitaj la plej gravaj el la sekretaj arestitoj. Sed en 1869 ĉiuj el simila speco “krimuloj” estis elkondukitaj el tiu ĉi, kaj la fortikaĵo estis aliformigita en militajn punrotojn. Fine, post dek jaroj, t.e. en 1879, punrotoj estis forigitaj kaj la fortikaĵo estis aliigita en disciplinan batalionon. Sed Ŝlisselburga fortikaĵo ne tro lon-

gan tempon estis libera de méto en ĝin politikajn "krimulojn." Dum la unuaj jaroj de la regado de Aleksandro III'a, tiu ĉi "caro-pacamanto," estis decidite restarigi la antaŭan signifon de la Slisselburga fortikaĵo, kaj por tiu ĉi celo aranĝi en ĝi novan malliberejon kun pli severa reĝimo. En tiu ĉi malliberejon estis decidite enŝlosadi ĉiujn plej agemajn, plej danĝerajn kaj nekvietebajn agantojn de la partio "Popola Volo." En 1883 tiu ĉi malliberejo estis fine konstruita, kaj de Aŭgusto, 1884, ĝi komencis pleniĝadi de arestitoj.

Ĝis 1869 en Slisselburga fortikaĵo estis granda, oni povas diri rimarkinda, biblioteko. Ĝi konsistis ne sole el rusaj libroj, sed ankaŭ francaj, germanaj kaj anglaj. Tiu ĉi biblioteko kolektiĝadis en la daŭro de multaj jaroj. Tie ĉi en antaŭaj tempoj oni tenis riĉajn, klerajn kaj instruitajn homojn, posedintajn signifajn, iafoje grandegajn, vivrimedojn. Multaj el ili, vivante tie ĉi, enskribis tien ĉi siajn bibliotekojn, kaj post morto aŭ liberigo oferis ilin je la profito de la fortikaĵo. La registaro ankaŭ ĉiujare asignis sufiĉe grandan monsumon por plenigo de tiu ĉi biblioteko. Tiamaniere ĝi kreskis plie kaj plie. Sed en 1869 tuta tiu ĉi biblioteko, kune kun arĥivo, estis transdonita en "III'an filion de propra de Lia Imperiestra Moŝto kancelario." Nun en la fortikaĵo restas nur mizeraj restaĵoj de tiu biblioteko.

Kiu neniam vidis kazematojn de ruslandaj politikaj malliberejoj, tiu ne povas prezenti al si eĉ proksimuman komprenon pri tio, kion prezentas per si kazematoj de Slisselburga fortikaĵo. Ili prezentas nenion alian, ol mikroskopajn ĉelojn; mallumaj, malpuraj, krudaj, malvastaj (tri paŝoj laŭlarĝe kaj kvar kun duono laŭlonge ĉiu) lokigantaj laŭlonge de longa koridoro. Ĉiu el tiuj ĉi ĉeloj havas apartan pordon; en pordoj estas malgrandaj malfermoj por transdoni al enŝlosito nutraĵon.

Multe da homoj estis enŝlositaj en tiu ĉi fortikaĵon, multe da ili mortis en tiuj ĉi muroj. Ne malofte tien ĉi oni enŝlosadis homojn junajn, plenajn je fortoj, esperoj kaj intencoj, je larĝaj, grandiozaj planoj, de kiuj estas tiel riĉa juneco. Tie ĉi ili pasigis dekojn da jaroj, maljuniĝis, malkapabliĝis, kadukiĝis, kaj oni ilin el tie ĉi ellasis grizaj, malfortaj, duonruinigataj maljunuloj, jam kapablaj nek al vivo, nek al feliĉo. Multaj ne transportis teruregojn de

enmeto fortikaĵa kaj frezeziĝis aŭ, iom post iom malkapablige, idiotiĝis. Oni ekzilis tien ĉi kiel eminentajn grand-sinjorojn, tempajn favoratojn, tiel ankaŭ ordinarajn mortemulojn. Krom regnaj, politikaj "krimuloj," antaŭan tempon tie ĉi turmentiĝis ankaŭ multaj "krimuloj" kontraŭ religio, kontraŭ la reganta eklezio, malgraŭ tio, ke por tiu speco de "krimuloj" ekzistis apartaj, specialaj monaĥejaj malliberejoj. Interalie, en Slisselburga kazematoj oni tenis dum longaj jaroj kelkaj el gvidistoj de diversaj religiaj sektoj kaj instruoj. Multaj el ili tiamaniere mortis tie ĉi. Sed vi vane serĉas iliajn tombojn—ĉiuj el ili estis enterigitaj ĉiam nokte, sekrete. Tombistoj ne sciis kiun ili enterigis. Tamen ĉiuj tiuj ĉi ruzaĵoj ne ĉiam atingis sian celon. Estas okazo, kiam sekretoj de malliberejaj servistoj malkovriĝis kaj adeptoj de tiu aŭ alia religia instruo eksciis kie nome estis enterigita ilia instruisto. Tiam tiuj ĉi tomboj iĝis objekto de adoro.

Kiom da rakontoj konserviĝas tie ĉi pri teruregoj de fortikaĵa enmeto! Oni diras, ekzemple, ke krom "sakoj" (tiel estas nomataj fortikaĵaj ĉeloj), tie ĉi ekzistas ankoraŭ apartaj subteraj malliberejoj, sub akvo. Tiuj ĉi malliberejoj kuniĝas, kvazaŭ, per apartaj subteraj trajoj. Juĝante laŭ kelkaj signoj, oni povas pensi, ke legendoj pri subteraj trajoj estas versimilaj.

Multaj, observante kazematojn, serĉas postsignojn de sango sur muroj, ĉar preskaŭ ĉiuj, laŭ multaj sendubaj faktoj, estas forte konvinkitaj, ke tie ĉi ekzistis inkvizicio! Interalie oni rakontas, ke multajn el malliberuloj oni tenis dum tuta ilia vivo en klina stato.

Jen ĝi, nia historia malliberejo! Jen ĝi, nia Bastille'o, nia Spandaŭ'o! Preskaŭ du centjarojn ĝi estis timigilo por saĝo, eŝafodo por penso. Malĝojegan memoron ĝi lasis post si en la memoro de la popolo. Teruregan sangan rolon estis aljuĝite ludi al tiu ĉi fortikaĵo en tiuj mallumegaj tempoj, en pleja disfloriĝo de malnobla, abomena cara aŭtokratismo. Ĝia rolo estas rolo de ekzekutisto, inkvizitoro.

Imagu al vi kavernon mallumegan, elhakitan el ŝtona maso, kun du truoj traboritaj en tiu ĉi maso. Tiuj ĉi anstataŭas fenestrojn. Ili estas faritaj tiel alte, ke eĉ starante sur planko, aŭ pli ĝuste sur fundo de tiu ĉi kaverno, vi ne havas eblon ion vidi tra tiuj ĉi "fenestroj." Sed se vi eĉ

prosperus enrigardi la neordinare profundajn truojn, tiam vi ekvidus nenion krom verdiĝintaj vitroj en dikaj fenestraj kadroj. Sunradioj neniam enpenetras tien ĉi, ne eklumigas, ne dispelas eternan mallumon, eternan krepuskon, kiu densiĝas en la mallumaj anguloj de tiu ĉi "sako." La muroj kaj arkaĵoj de tiu ĉi "sako" spiras morton kaj putron. Vi sentas vin kiel homon elirantan el katakombo. Kiel malproksime de tie ĉi saĝas tia vivo, tiuj homoj, tiu mondo, inter kiu vi ĵus vivis kaj agis!

Putraĵo estas trasorbegita de la sufokanta aero. La spiro kumpremas de tiu ĉi aero; pulmoj rifuzas labori. Antaŭ okuloj stariĝas verdaj rondoj kaj makuloj. Pezaj, maldolĉaj pensoj penetras la kapon. Oni nevole pensas: kiom da altaj, belegaj ideoj pereis sub la arkaĵoj de tiuj ĉi mallumegaj muroj! Kiom da intencoj puraj, altaj kaj noblaj, sufokiĝis en mallumo de izola, porĉiama enmeto!

### POR LA RIDETO

Esperantigis Martha A. Boughton

Sinjorino Talmadge rakontis anekdoton pri infanineto: Unu tagon, vekigante el dormeto, ŝi ekriis: "Patrino, pro kio mi ploris, antaŭ ol mi ekdormis?"

Ŝia patrino ridetis kaj diris, "Vi kriadis ĉar mi ne permesis al vi havi la poŝhorloĝon de via patro."

"Ho jes" ŝi respondis, "mi nun rememoras." Tiam sulkigante sian vizaĝon, ŝi daŭris, "Boo—boo—boo—, boohoo, boohoo!"

Unu vidvino, kiam ŝia edzo mortis, elspezis \$3500.00 pro la tombŝtono, sur kiu ŝi faris skribaĵon:

Mia malĝojo estas tiel granda, ke mi ne povas ĝin porti

Antaŭ ol unu jaro pasis, ŝia malĝojo ankaŭ tiel pasis suffice, kaj ŝi edziniĝis kun junulo. Tiam ŝi aldonigis al la skribaĵo la vorton

sole.

Instruita pastro paroladis kun unu neinstruita.

"Vi estis ĉe kolegio, ne vere?" diris la dua.

"Jes, mi estis," li respondis.

"Mi estas tre dankema," diris la nesciulo, "ke la Dio estas malferminta mian buŝon sen lernado."

"Tiu okazis en la tempo de Balaam" estis la respondo.



## LA KUNVENO

Rakonto de Turgenef, el ruse eperantigis R. H. Geoghegan  
(Daŭrigate)

Viktor maldiligente etendis la manon, prenis kaj senzorge flaris la florojn, kaj komencis turnigi ilin inter la fingroj kun reva seriozemo, rigardante aeren. Akulina rigardis al li. . . . En ŝia malĝoja mieno estis tiom da mola sindonemo, da respekta submetiĝo, kaj da amo! Ŝi kaj timis lin kaj ne kuraĝis plori, kaj adiaŭis kun li kaj admiris lin je la lasta fojo; sed li kuŝigita, etendita kiel sultano kaj kun grandanima pacienco kaj cedemo toleris ŝian adoradon. Mi, mi konfesas, kun indigno konsideris lian ruĝeman figuron, sur kiu, trans hipokrita malestiminda indiferento sin montris kontenta supersatigita vanteco. Akulina estis tiel ĉarma en tiu momento; tuta animo ŝia fideme pasie sin devualigis antaŭ li, sin etendis, karesadis al li, kaj li. . . . li faligis la cejanojn sur la herbaĵon, tiris el flanka poŝo de la palto rondan vitraĵon en bronza randaĵo kaj provis enpremi ĝin sur la okulon, sed devis multe sin penigi por subteni ĝin per kuntirita frunto, allevita vango, kaj per la nazo mem—la vitraĵo ĉiam sin detiris kaj falis al li en la manon.

“Kio estas tio?” demandis, fine, surprizata Akulina.

“Monoklo,” respondis li kun graveco.

“Por kio?”

“Nu, por pli bone vidi.”

“Montru do.”

Viktor sulkigis la frunton, sed donis al ŝi la vitraĵon.

“Ĝin ne rompu; gardu.”

“Ne timu, mi ĝin ne rompos.” Ŝi timeme almetis ĝin al sia okulo. “Mi nenion vidas,” naive diris ŝi.

“Sed ĉi la okulon fermu,” respondis li laŭ voĉo de nekontenta instruisto.

Ŝi fermis la okulon antaŭ kiu ŝi tenis la vitraĵon.

“Sed ne tiun, ne tiun, simplanimuletino, la alian!” ekkriis Viktor kaj, ne permesante al ŝi korekti ŝian eraron, li formetis de ŝi la lorneton.

Akulina ruĝiĝis, sensprite ridetis, kaj sin deturnis.

“Videble al ni ĝi ne konvenas,” diris ŝi.

“Ho! mi ĝin kredas!”

La mizerulino silentadis kaj profunde sopiris.

“Ha ! Viktor Aleksandroviĉ, kiel tio estos al ni esti sen vi—” parolis ŝi tuje.

Viktor viŝis la lorneton per la paltorando kaj metis ĝin ree en la poŝon.

“Jes, jes,” ekdiris li fine, “al ci komence estos dolore efektive.” Li cedeme frapetis ŝin sur la ŝultro ; ŝi dolĉe prenis la manon sur sian ŝultron kaj timeme ĝin kisis. “Nu, jes, jes, ci estas efektive filino bona,” aldonis li, malmodeste ridetante ; “sed kion fari ? Ci mem juĝu ! al ni kun la sinjoro estas neeble tie ĉi resti ; nun baldaŭ estos vintro kaj en vilaĝo vintre—ci mem scias—estas simple abomenindaĵo. Alia afero en Peterburgo ! Tie simple estas tiaj mirindaĵoj, kiaj ci, simplanimulino, ankaŭ en revo al vi prezenti ne povas. Domoj tiaj, stratoj, kaj la societo, la civilizacio—estas simple admirindaĵo !”

Akulina aŭskultis lin laŭ manĝegema atento, ete malferminte la lipojn, kiel infano. “Alie,” aldonis li, returnante sin sur la tero “por kio mi al ci ĉion ĉi diras ? Certe ci tion kompreni ne povas.”

“Kial do, Viktor Aleksandroviĉ ? Mi komprenis, mi ĉion komprenis.”

“Jen, kia ŝi estas !”

Akulina mallevis la kapon.

“Antaŭe vi kun mi ne tiel parolis, Viktor Aleksandroviĉ,” diris ŝi ne altiginte la okulojn.

“Antaŭe ? antaŭe ! Vidu ci. . . . Antaŭe !” rimarkis li, kiel indigne.

“Tamen, al mi estas tempo por iri” diris Viktor, kaj jam li estas preskaŭ sin apoginta sur la kubuto.

“Atendu ankoraŭ nemulte,” laŭ petegema voĉo elparolis Akulina.

“Kial atendi ? Nun fine mi adiaŭis kun ci. . . .”

“Atendu” ripetis Akulina.

Viktor ree sin kuŝis kaj komencis fajfi. Akulina ĉiam ne detiris de li la okulojn. Mi povis observi ke ŝi iom post iom falis en malkvietecon ; ŝiaj lipoj tremis, palaj ŝiaj vanĝoj malforte roziĝis.

“Viktor Aleksandroviĉ,” ekdiris ŝi fine, laŭ disrompita voĉo ; “al vi estas peke—al vi estas peke, Viktor Aleksandroviĉ ; ja, pro Dio !”

“Kio estas tiel peka ?” demandis li, sulkiginte la frunton, kaj ete li sin levis kaj turnis al ŝi la kapon.

“Estas peke, Viktor Aleksandroviĉ. Se nur amindan paroleton al mi vi dirus por adiaŭo ; se nur paroleton al mi vi dirus, al mi malfeliĉa orfino. . .”

“Sed kion mi al ci diros ?”

“Mi ne scias ; vi tion pli bone scias, Viktor Aleksandroviĉ. Jen vi forvojaĝas, kaj se nur paroleta. . . . Kiel mi tion ĉi meritis ?”

“Kiel ci estas drola ! Kion do mi povas ?”

“Sed nur paroleta. . . .”

“Nu, ŝi ŝargadas ĉiam tiun saman,” elvortis li kun kolereto kaj sin levis.

“Ne koleru, Viktor Aleksandroviĉ,” rapide aldonis ŝi, apenaŭ detenante la larmojn.

“Mi ne koleras, sed sole ci estas malsaĝa. Kion ci deziras ? Certe mi kun ci edziĝi ne povas ? Certe ne povas ! Nu, kion do ci deziras ? Kion ?” Li forenŝovis la figuron kiel atendante respondon kaj disŝtrecis la fingrojn.

“Mi, nenion. . . . nenion mi volas,” respondis ŝi balbutante kaj apenaŭ kuragiĝante etendi ĝis li la tremantajn manojn ; “sed ankaŭ, se nur vorteto por adiaŭo. . . .”

Kaj la larmoj forfluis ĉe ŝi laŭ rivereto.

“Nu, tiel ankaŭ estas, ŝi komencas ploradi,” malvarmsange elvortis Viktor, mallevente de malantaŭe la ĉapeton sur la okulojn.

“Mi nenion volas,” almetis ŝi ploregante kaj kovrinte la vizaĝon per ambaŭ manoj ; “kiele do al mi nun estos en la familio, kiele al mi ? Kaj kio do al mi alestos, kio fariĝos je mi, malfeliĉulino ? Al malamindulo oni edzinigos la orfinon. Bedaŭrindega mi !”

“Rekantadu, rekantadu,” laŭ duonvoĉo murmuris Viktor, piedbatante sur la lokon.

“Kaj li, se nur vorteto, se nur unu. . . Tia kia ‘Akulina,’ tia kia ‘mi. . .’”

Subitaj korŝirantaj ploregoj ne permesis al ŝi fini la vortojn ; ŝi faligis la figuron sur la herbaĵon kaj akreme, akreme forlarmadis. La longe entenata malĝojo elŝprucis sin fine laŭ torento.

Viktor staris kelkan tempon apud ŝi ; staris kelkan tempon, plialtigis la ŝultrojn, sin deturnis, kaj foriris laŭ gran-

daj paŝoj.

Depasis kelkaj momentoj. . . . Ŝi kvietiĝis, suprentiris la kapon sin levis, posten rigardis, kaj frapis la manojn unu kontraŭ la alia ; preskaŭ ŝi kuris post li, sed la kruroj al ŝi sin defalĉis—ŝi falis al la genuoj. . . . Mi ne min tenis plu kaj antaŭensaltis ĝis ŝi ; sed apenaŭ ŝi havis tempon por min rigardi antaŭ kiam ŝi kunigis la fortojn, kun malforta krio sin relevis kaj malaperis post la arboj, lasante la disĵetitajn florojn sur la tero.

Mi staris kelkan tempon, kolektis la bukedon da cejanoj kaj foriris el la arbaro sur la kampon. La suno staris malalte sur la pale-hela ĉielo, radioj ĝiaj mem kvazaŭ estis paligintaj kaj malvarmigintaj ; ili ne brilis, ili sin disŝutis laŭ unuforma, preskaŭ akva lumo. Ĝis la vespero ne restis pli multe ol duonhoro, kaj la ĉielruĝo apenaŭ sin ekfajris. Viv-ega vento rapide kuris al mi renkonte trans la flava kaj sekiginta eksherbaĵo ; rapidege sin suprenigantaj antaŭ ĝi, preterkuregis sur la vojo laŭlonge la arbarbordero, malgrandaj rekurbigintaj folioj. La flanko de la arbaro, turnita laŭ muro ĝis la kampo, tuta tremis kaj briletis laŭ malforta brilo, klare sed ne hele ; sur la dube-ruĝa herbaĵo, sur la trunketoj de herbo kaj de pajlo, ĉie lumis kaj sin agitis senombraj fadenetoj de aŭtunaj araneoj.

Mi haltis. . . . mi fariĝis malgaja ; trans la ĝoja kvankam freŝa rideto de velkanta naturo, ŝajnis, sin traglitigis la melankolia timo de ne-malproksima vintro.

Alte super mi, peze kaj tranĉe fendante la aeron per la flugiloj, pasis prudenta korvo, kiu deturnis la kapon, rigardis al mi de flanko, sin suprenigis, kaj intertempe blekante, sin kaŝis post la arbaron. Granda bando da kolomboj neatendite sin traportis en draŝejon kaj, tuj sin turnigadinte laŭ kolono, klopodeme sin dismetis sur la kampon—divenigo de la aŭtuno. Iu ajn preterveturis post la nudigita monteto, laŭte bruegante per senenhava ĉareto.

Mi revenis domen ; sed la imago de la mizera Akulina longe ne eliris el mia kapo, kaj cejanoj ŝiaj, delonge velkintaj, ĝis tiu ĉi sezono sin konservas ĉe mi.

(La Fino)

### LA MIOZOTO

El germana kanto de H. H. von Fallersleben tradukis H. Lincke.

*Mi konas unu floron  
En nia arbaret',  
Kun kul' ĉielblua  
Kiel viaj, karulet';  
Kaj kvankam ne aŭdante  
Mi bonkomprenas ĝin,  
Paroletanta dolĉe:  
"Vi ne forgesu min!"*

*Vidante viajn bluajn  
Okulojn, karulet',  
Mi pensas pri la floro  
En nia arbaret';  
Kaj ne povante diri  
Kiel mi amegas vin,  
La koro paroletas:  
"Vi ne forgesu min!"*

### ĜUU LA VIVON

El germana kanto de Usteri mallongigis H. Lincke

*Ĝuu la vivon  
Dum vi ĝin havas nun.  
Kolektu rozojn  
Antaŭ aŭtun'.*

*Sertante nur por malkontent',  
Por dornoj en la mondtoŝent',  
Ni ofte kun indiferent'  
Forĵetas la violojn.*

*Ĝuu la vivon . . . . ke.*

*Jen, post la pluvo je maten'  
La suno brilas, kaj la gren'  
Elmaturigas sian ben'  
Pli bone pro la pluvo.*

*Ĝuu la vivon . . . . ke.*

*Honeste ĉiam agu vi,  
Kaj en la ĥaos' tie ĉi  
Ne sen bonŝanco estos vi,  
Kaj via kanto estos:*

*Ĝuu la vivon . . . . ke.*



## KVAR INTERESAJ ELPENSAĴOJ

### I. Stenografio Por Blinduloj

La estimata, mortinta Daktoro Javal, en sia bonega verko titolita "Inter Blinduloj," priskribis pri la manko kaj granda dezirindeco eltrovi ian metodon de internacia stenografio uzebla de blinduloj. Kompreneble, ĝi necese devas esti en Brajlo reliefskribebla. Multe da personoj interesiĝos, kaj ne malmulte el ili tre ĝojos, eklernante ke metodo antaŭ nelonge estis elpensita por angleparolantaj blinduloj de Sinjoro Alfred Wayne, de Birmingham, England, kaj, kredeble, simila sistemo povus fariĝi taŭga por ĉiuj blinduloj kiuj scias Esperanton. Eble, ĝi fine estos elverkita por plenumi ĉiujn internaciajn mankojn kaj bezonojn. La sistemo supre citita estas uzata en nova skribmaŝino kiu portas kunvolvaĵon da papero tre mallarĝa. Sur tiun paperon, kiu estas suface longa por daŭri kelkajn horojn, blinda stenografisto povas reliefskribi en Brajlo tre rapide. Unu el tiuj maŝinoj estas uzata en la Perkins Institution por blinduloj, en South Boston, Massachusetts, kie ĝi ja estas tre ŝatata.

### II. La Telegrafono

Amerika kompanio nun promesas fari kaj baldaŭ vendi specialan formon de la mirega telegrafono elpensita de Poulsen, en Danujo. En tiu ĉi nova (projektata) maŝino, oni uzos malgrandajn diskojn elfaritajn el ŝtalo, sur kiujn la parolanto povos paroli, kaj kiujn li tiam povas sendi ien en la mondo. La ricevinto nur devos enmeti tian diskon en sian propran telegrafonon kaj li aŭdos la vortojn surdiritajn sur ĝin. Rapide venu la feliĉa tago kiam oni povos interkorespondi parole.

### III. Skribmaŝino Por Aŭtomate Duoblige Leterojn.

Per nova skribmaŝino, ĵus elpensita de Sinjoro McCall, en Columbus, Ohio, oni povas skribi la tekston de letero sur specialan paperon, tiamaniere ke la tipoj tranĉas tra la papero, kiu, tial, poste montras multe da malgrandaj truoj iom similaj al la ŝajno de meĥanika muzikaĵo uzata en aŭtomataj fortepianoj. Oni ankaŭ simile traskribas sur apartan paperon, la necesajn datojn, adresojn, kaj salutojn. La du paperoj tiel tranĉitaj tiam enmetiĝas en du partojn de la

nova skribmaŝino kiu funkciadas per elektra motoro. Unue, ĝi enskribas iun adreson, k.t.p., kaj tiam, due, la skribmaŝino efektive komencas aŭtomate elskribi la tekston de la originala letero, laŭlitere. Tia maŝino devas esti tre utila al grandaj firmoj aŭ kompanioj kiuj skribas multe da leteroj ĝuste similaj, unuj al la aliaj, sed adresitaj al diversaj personoj. Ĉiu letero ŝajnas esti originala, kiel ĝi vere estas, ĉar ĉiu letero skribiĝas aparte. Tiu ĉi maŝino povas skribi ĉirkaŭ 200 vortojn ĉi minute, tio estas, 12,000 ĝis 15,000 ĉiuhore.

#### IV. Skribado Aŭtomata Per Diktado

Sinjoro McCall, uzante la principojn de la maŝino ĵus priskribita, nun proponas fari, kaj efektive, parte ellaboris provan pli miregan skribmaŝinon, en kiun oni povos endiri leteron tiel kiel en ordinaran telefonon, kaj la maŝino aŭtomate elskribos la leteron en romajn tipojn. Afero preskaŭ nekredebla! Sinjoro McCall tre atente ekzamenis, kun mikroskopo, la figurojn de multe da literaj sonoj kiel ili sin montras sur la cilindro de ordinara fonografo, kaj li fine sukcesis interdistingi inter ili, ĝis nun, li povas respondi elektran pintaĵon kiu presigas romajn tipojn sur ordinaran paperon el kunvolvaĵo. Li tion faras laŭ cent (100) da diversaj sonoj lingvaj. Simila projekto estis priskribita en la ĵurnalo monata *Scientific American*, por la 23a de Novembro, 1907a, sur paĝo 379.

### PRI NOVA FLUGMAŜINO.

Lasta sukceso de aerostatoj (direkteblaj balonoj) ŝovis tro malantaŭen la ĝisnunajn rezultatojn de la eksperimentoj kun aeroplanoj kaj ilin preskaŭ malaperigis. La aerostatoj ŝajnis preferindaj per sia pli granda sendanĝereco, dume ĉe aeroplanoj la sendanĝero de aerveturanto neniom estis garantiita, aŭ nur sufiĉe ŝirmita.

Grandegan ŝanĝon alportas la aeroplano, kies modelon post multjaraj sperto kaj studado, same kiel post multaj eksperimentoj konstruis juna aerveturisto bohema. La nova aeroplano montras la sole eblan vojon al ĝusta solvo de la problemo de absoluta sendanĝereco kaj perfekta direktob-

leco de dinamikaj flugmaŝinoj. Ĝi estas malpeza kaj tre simpla; flugante ĝi ne almetas platojn al kontraŭstaro de l' aero. Eventuale se la maŝino ĉesus funkciadi, ĝi tute malrapide falos teren, ĉar la flugiloj de ĉiuj flankoj de la maŝino formas platojn kapablajn tute malhelpi la falegon, kies rapidon moderigos 36 kvadrataj metroj da flugiloj.

La nova aeroplano ekleviĝas birdmaniere. Kelke da flugiloj, kies platoj faras 72 kvadratajn metrojn, venkas per potenca svingado la tre malgrandan pezon kaj revenas en sian originalan situacion, tranĉante la aeron per akraj randoj, kaj per propra inercio anstataŭiĝas per aliaj flugiloj, preparitaj por funkciadi.

La modelo mem surprizas per sia simpla kaj cела konstruo, kaj la skribanto de tiu ĉi artikolo konvinkiĝis, ke ĉi tiu aeroplano signifas templimon en la aerveturado, de kiu ĉesos la demando pri la principoj de artefarita flugado, ĉar hodiaŭ ĝi estas jam solvita.

Ĉiujn demandojn kaj proponojn koncerne la plej novan eltrovaĵon respondos la skribanto, kiu la modelon vidis, sed detale priskribi ne rajte povas. Li esperas, ke la juna aerveturanto jam baldaŭ povos transdoni sian modelon al formiĝonta kompanio. Samideanoj, bonvolu afable traduki ĉi tiun artikolon kaj ĝin publikigi nacilingven en viaj gravaj ĵurnaloj.

—*J. F. Kuhn*, Instruisto, Jiĉin, Bohemujo, Aŭstrio

## EL LA PRESEJARO ESPERANTISTA

(Ian esperantan libron tie ĉe priskribitan, aŭ alian esperantan libron, kie ajn publikigitan, oni povas mendi ĉe *Amerika Esperantisto*, kaj ĉe ni ankaŭ aboni aŭ aĉeti unu ekzempleron de ia eŭropa gazeto).

**Esperantista Kantaro.**—La jenan verketon aranĝis kaj eldonis Sro. Karl Jost, el Zurich, Svisujo. Ĝi enhavas dektri kantoj, el kiuj dekdu estas aranĝitaj por kvar voĉoj, kaj tre utilis por la entuziasmigo de niaj kunvenoj. La prezo estas Sd. 40. Provizon da la Kantaro oni baldaŭ havos ĉe *Amerika Esperantisto*.

**Slava Revuo.**—Oni promesas, ke je la komenco de la jaro 1908, aperos nova gazeto, sub la citita titolo. Ĝi konsistos, diras la eldonantoj, plej multe el tradukaĵoj el la slava literaturo. Oni ankaŭ petas la sendon de tradukaĵoj

el aliaj lingvoj. Pri ĉio, adresu Sron. F. Vejmelka, Benešov apud Praha, Bohemujo, Aŭstrio.

**Naŭlingva Etimologia Leksikono.**—Tiu ĉi por la lingvisto aŭ verkisto tre gravan verkon preparis Louis Bastien kaj publikigis la Presa Esperantista Societo. Prezo, Sm. 1.20. La libro enhavas 247 paĝojn, kun la Esperantaj vortoj sekvataj de siaj sinonimoj (kiam ili devenas el sama radiko) en ok aliaj lingvoj, nome: latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa. Ĉiu propagandisto trovos la libron plej utila, ĉar ĝi plene pruvas la internaciecon de la radikaro de Esperanto.

**Unua Legolibro.**—Tiu ĉi verko de 179 paĝoj de la bonege konata verkisto, Dro. Kabe, prezentas al la leganto graditajn legaĵojn je la plej klara stilo de l' aŭtoro. Komencas la unuan parton anekdotoj kaj rakontoj, sekvataj de mallongaj interesaj diversajoj. La dua parto enhavas el-tiraĵojn de noveloj, frazlibreton kaj modelojn de leteroj. Tiu ĉi libro, prezo 1.50 Markoj (0.75 Sm), tre utilas al Esperantaj studentoj kiuj povas tre profite uzi ĝin tuj post ellernado de gramatiko, kaj ĝi estas aĉetebla ĉe *Esperanto Verlag Moller & Borel, Berlin, S., Germanujo.*

(J. W. Marelius, Chicago)

**Konkordanco de la Ekzercaro.**—Ellaboris Alfred E. Wackrill, kun antaŭparolo de Rektoro E. Boirac. Tiu ĉi grava verketo promesas esti nur komenco de serio da similaj libroj kiuj, sendube, devos esti tre utilaj kaj tre uzeblaj je la tuta Esperantistaro. La unua libreto, nun priskribata, enhavas 95 paĝojn kaj prezentas alfabete ĉiun vorton aperantan en la "Ekzercaro" de Zamenhof, kun la diversaj frazoj, tiamaniere montrante ĉiun apartan uzon de ĉiuj tiaj vortoj. Tre malmulte da prezeraroj sin trovas. Mi tre favore rekomendas la verketon al ĉiu Esperantisto. La prezo ne aperas. Adresu: Hachette & Ko., 79, Boulevard St. Germain, Paris, France. *E. F. McP.*

**La Faraono.**—Interesege romano historia, tradukita el pola lingvo de Dro. Kazimierz Bein (Kabe), kaj publikigita de Hachette kaj Ko., Paris. Tiu ĉi granda verko (jam aperas du volumoj, kiujn tria sekvos), estas samtempe tre interesa kaj tre instrua. La scenejo estas Egipto; tempo, antaŭ kvardek centjaroj; la heroo, egipta princo, Ramzes, poste faraono. La aŭtoro tranĉe analizis ne sole la homan karakteron, sed ankaŭ la instituciojn. Kiu ajn legos "La Faraono," tiu ne evitos ĝian influon, kaj ĉiu liberanima homo certe ĝuos ĝin. Kaj ĝuante, oni povas certigi al si, ke li legas bonan Esperanton, ĉar pri tio sufiĉas la nomo mem de la tradukinto.

CANCELLED

## DEKLARACIO DE LA GAZETOJ

Por gardi kontraŭ la danĝerajn sekvojn de libera riparado kaj "plibonigado" de nia lingvo, multaj gazetoj ĝis nun estas aliĝintaj al la Esperantista Gazetista Asocio, kiu konsistas el ĉiuj gazetoj, kies direktoroj subskribis la jenan deklaron, akceptitan kaj reaprobitan de la gazetistaj kunvenoj en Boulogne 1905, Genevo 1906, kaj Cambridge 1907 :

"La subskribintoj, redaktoroj de esperantistaj gazetoj, promesas :

"Unue: Klopodi por atingi en siaj gazetoj kiel eble plej grandan korektecon de la lingvo kaj obeadi la regulojn kaj fundamenton de la Zamenhofa lingvo Esperanto.

"Due: Eviti ĉiujn farojn aŭ diskutojn, kiuj celadus iel ajn ŝanĝi la Zamenhofan lingvon.

"Trie: Rekomendi nur eldonaĵojn, verkojn, gazetojn, kiuj same obeas la regulojn kaj fundamenton de la Zamenhofa lingvo; kaj se ili raportas pri aliaj, almenaŭ montri iliajn neakcepteblajn flankojn."

Aliĝis al tiu Deklaracio: Lingvo Internacia, La Revuo, Juna Esperantisto, Tra la Mondo, Esperanto, Internacia Scienca Revuo, Espero Katolika, Espero Pacifista, L'Esperantiste, The British Esperantist, Germana Esperantisto, Bulgara Esperantisto, Pola Esperantisto, Ĉesky Esperantist, Svisa Espero, Laboro, Socia Revuo, American Esperanto Journal, Brazila Esperantisto, Paris-Esperanto, Amerika Esperantisto.

Pri la supra deklario, oni devas klarigi ke eble neniu el la subskribintoj konsideras, ke Esperanto estas lingva perfektaĵo. Certe tion ne kredas Zamenhof mem. Kaj tiu netuŝebleco de la fundamento, pri kiu tiel ofte parolas kaj skribas la estroj de Esperantujo, estas la sole ebla defendilo kontraŭ disrompado kaj nenieco por nia afero.

## FAKO DE KORESPONDADO

Your name and address below, two issues, 25 cents.

\*Oni deziras nur leterojn: \*nur poŝtkartojn ilustritajn.

John Springer, Box 545, Red Cloud, Nebraska, U. S. A.

R. W. Tillotson, 221 East Fifth St., Erie, Pa., U. S. A.

Edwin R. Fleming, 502 Ann St., Columbia, Missouri, U. S. A.

\*Sro. Le Grignoux. 45, rue de l' Esperance, Paris, XIII.

\*F. J. Macalik, I. U. S., Hamovu, Hungary.

\*J. Jenč, Havličkova 37, Prag-Zizkov, Austria.

Karl Jost, Zwinglstr. 13, Zurich III, Switzerland.



## "CONSTITUTION AND BY-LAWS" OF THE "AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION"

1. The name of this Association shall be the American Esperanto Association.

2. It exists for the purpose of promoting the use of Esperanto, the auxiliary international language.

3. Its principal objects are: to furnish information; to unite Esperantists, both individuals and local societies; and to publish the "American Esperanto Journal."

4. Membership in the Association costs individuals \$1.50 a year; societies, \$2.00. These fees include a year's subscription to the Journal.

